Sennaciulo


Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda


Junio 2000
ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

71-a jaro, n-ro 6 (1140)
MENSUEL/MONATA

Moskvo





Moskvo atendas S.A.T.–anojn !
Ne atendu la lastan momenton !

❑ Kiel statas nia PIV (p.62)
❑ Sesdek procentoj (p.66)
❑ Taga vivo (p.63)
❑ Unua Majo en Parizo (p.68)
❑ Raporto de la P.K. (p.64)
❑ Viaj reagoj (p.70)

SAT SUR TTT :http://www.multimania.com/satesperanto

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

EL LA REDAKTEJO....

Karaj gekamaradoj,
en la manoj vi tenas la junian numeron de Sennaciulo en kiu, kiel kutime troviĝas la Jarraporto de la Plenum-Komitato. Tio ankaŭ signifas ke baldaŭ okazos nia Kongreso en kiu vi devos prijuĝi la lastjaran agadon de la Asocio. Sed, ĉu ĉi-jare tio eblos? Ja, ĉi-jare aliĝis al la kongreso terure malgranda nombro da kongresanoj. Kial? Ni iras al la lando kiu ludis gravan rolon en la esperantista kaj laborista movadoj. Principe ĝi devus esti interesa por SAT-anoj, des pli ke antaŭe ni ne povis kongresi en Sovetio. Ja, SAT ĉiam esti «danĝera», «malamika», eĉ «faŝista» organizo. Almenaŭ KGB kaj similaj antaŭaj organizoj tiel konsideris nin.
Nun ni povas tie kongresi kaj ni povas publike kritiki la novan reĝimon kaj militon en Ĉeĉenio. Ni, kiuj partoprenos, certe tion faros. Sed kian pezon tio havos se ni estas nur kelkaj? Do, decidiĝu eĉ lastmomente kaj venu. SAT bezonas vin! Esperante ke miaj vortoj ne estos vanaj, kamaradece salutas vin,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@cybercable.fr. sat@esperanto.nu
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut, P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT
Abonnement annuel/jara abono, France: 336 FRF aŭ 51,70 €
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Kiel statas nia PIV ?

Antaŭ preskaŭ du jaroj aperis en Sennaciulo artikolo sub tiu sama titolo, kun la iom optimisma anonco "ni jam ekvidas la finon de nia laborado". Intertempe multaj uzantoj de nia lingvo sin demandis, ĉu tiu fino estas baldaŭa realaĵo aŭ fatamorgano.

Al la tiam donitaj informoj ni povas nun aldoni la jenon. La revizia laboro laŭ fakoj estas esence finita. Komenciĝis antaŭ kelkaj monatoj la vere lastaj necesaj laboroj. La relegado de la tuto fare de la ĉefa reviziantο kaj la unua vico de korektado fare de la teamo de korektantoj (37 volontuloj anonciĝis por tiu malfacila tasko) atingis la literon R. Post la fino de tiu unua vico venos la dua vico kun la definitiva enpaĝigo, t.e. kun la ilustraĵoj. Intertempe laboregas niaj respondeculoj pri ilustraĵoj, inter kiuj menciindas G. Lagrange, S. Sire - kiuj okupiĝas pri diversflanka teknologio, elektroniko k.a. - kaj precipe C. Roux, kiu prenis sur sin la pezan taskon ne nur elekti ilustraĵojn rilatajn al botaniko kaj zoologio, sed krome zorgi pri komputila pritrakto kaj enpaĝigo de ilustraĵoj.

Ni konscias, ke multaj uzantoj de la ĝisnuna PIV atendas senpacience tiun novan eldonon. Ili konsciu, ke tiun atendadon kaŭzas nia zorgo liveri kiel eble plej bonan verkon. Al ili ni ŝuldis klarigojn pro la prokrasto kaj trankviligon pri la baldaŭa atingo de la celo.

Michel DUC GONINAZ

SAT-FRAKCIO PRI LA DISTRIBUA EKONOMIO



La 12-an de aprilo 2000, la "Klubo de Parizo" (Club de Paris) estis priparolanta la ŝuldon de kelkaj malriĉaj landoj, en la Ministrejo pri financoj en Parizo. Pluraj asocioj (ATTAC, SEL,..) sindikatoj kaj unuopuloj kaptis la okazon por protesti kontraŭ la maljusta monpremo sur la tiel nomataj evoluantaj landoj. SAT-Frakcio pri la Distribua Ekonomio partoprenis, montrante fiere dulingvajn banderolojn kun teksto (france kaj esperante): Mondcivitanoj, forĵetu ni ĉian diktaturon, monan, profitan kaj aliajn". (vidu foton).

- Nia nova rubriko -



Redaktoro : Gerardo Rollin; 88 str. Victor Hugo; FR-37 400-AMBOISE
<a.reto@france-association.com>

Karaj gelegantoj,

Denove ni parolos pri la morto. La kontribuoj tieaj estas plej diversaj, kaj mi atendas artikoleton, kiu iel klopodus sintezi ilin.

Same ni povus pli larĝigi la temon al najbaraj temoj. La subaj fotoj intence celas tion.

Vi parolu libere, sed… koncize.

Gerardo



Mortigo de supozata ribelulo en Saigono, dum la tiea milito.

Verŝajne estas malmultaj homoj kiuj travivis tiom leĝeran entombigon

En Svedio eblas nuntempe entombigi homojn sen intermikso de la eklezio. Jen mi volas informi pri mia patro Adriano Persson, kiu mortis antaŭ preskaŭ dudek jaroj (1981-04-15).

Li estis preskaŭ denaska liberecano. Dum la 20aj kaj 30aj jaroj li aktivis en la stokholma liberecana movado kaj en ties gazeto «Brand» (Brulo). Li estis lerta portret-desegnulo, kion oni povis konstati en la gazeto, kaj li ankaŭ povis produkti frapajn kulisojn por la teatraĵaj prezentadoj de la liberecana teatra grupo.



La entombigo de Vincento Voulant en Marsejlo 1947; (laŭ libro de R. Mencherini).

Li estis unu el la fondintoj de la Anarkiista Esperanto-grupo en Stokholmo en la fino de la 20aj jaroj. Li apartenis al la redakcioj de la gazetoj, kiujn la grupo eldonis: «La serioza rido», «La kamarado» «Laboristo». Dum la hispana interna milito, la grupo kolektis monon favore al CNT-FAI. Kiam la esperanto-sekcio de CNT (la anarkisindikatistoj) komencis eldoni sian «informan bultenon», Adriano iĝis kontaktulo por ĝi en Svedio.

Dum la jaroj 1974-78, li kunlaboris en la redaktado de «Liberecana Ligilo», la organo de la Liberecana Frakcio de SAT. Li sukcesis liberigi sin de la plej multaj antaŭjuĝoj, kiuj balastas multajn homojn. Li opiniis i.a. ke la idoj ne havas devojn rilate la bonstaton de siaj gepatroj. La idoj ne petis de siaj gepatroj pri siaj vivekestoj. Do, la gepatroj havas la devon laŭ siaj povoj helpi siajn geidojn trairi siajn vivojn kiel plej eble senĝene. Rilate la morton, li havis tiun ideon, ke ne indas maltrankviliĝi pri sia stato postmorta, ĉar estas ja neniu kiu maltrankviliĝas pri la tempo antaŭ sia naskiĝo.

Li estis homo kiu vidis la tragedi-komedion en la homa viv-baraktado. Liaj amikoj konceptis lin kiel viv-artiston, kaj je lia entombigo ili eĉ rakontis anekdotojn, kiuj certe estus aprecataj de Adriano se li povus anime ĉeesti sian propran entombigon.

Verŝajne estas malmultaj homoj kiuj travivis tiom leĝeran entombigon kiel tiu de Adriano.

Tutestime salutas! Pelle.



MALLONGE

Kvin savitoj el la inundoj en Mozambikio mortis, piedfrapitaj la 23an de marto en la rifuĝejo de Chiaquelane, dum fulmkurado al disdonado de trinkakvo.

Kartvelino, elmigrinta al Grekio, plenumis, pere de portebla telefono, la mortan riton «Dateriba», sen kiu mortinto eterne ĝemus. Dum la morta vigilado de ŝia patro, laŭtparolilo transsendis la vortojn de la filino.

Du familioj el Nico (FR), viktimoj de eraro far enteriga agentejo, deponis plendon ĉe la policejo, ĵus post interŝanĝo de cindrujoj, pro ĉeesto de cindrigo de alia avino.

RAPORTO DE LA PLENUM-KOMITATO

por la periodo de aŭgusto 1999 ĝis majo 2000

Plenum-Komitato

Dum tiu ĉi periodo okazis referendumo pri la nova Plenum-Komitato, kiu estis prezentita dum la kongreso en Karlovy Vary. Dum tiu ĉi kongreso venis novaj proponoj pri la ŝanĝoj en la Statuto rilate al la elekto de la Plenum-Komitato (vidu la proponon de k-do Bustin en S-ulo de majo 2000), kaj la statutŝanĝo estos proponata al la kongreso en Moskvo. La nova Plenum-Komitato estas elektita por la periodo 2000-2003, kaj ĝi ekfunkciis la 1-an de marto 2000.

Gvidrezolucio : La Plenum-Komitato kontrolas ĉu oni plenumis aŭ plenumas ĉiujn taskojn laŭ la lasta kongresa gvidrezolucio. La PK ĉion plenumis, sed la Komisiono pri la ŝanĝo de la mondmapo ne donis vivsignon.

ERA - post la interŝanĝo de leteroj inter ERA (Esperanta Radikala-Asocio) kaj la PK laŭ kiu ERA asertas ke ĝi ne havas rilatojn kun la eŭropa parlamenta grupo "Bonino" kaj ekstremdekstraj partioj, la PK decidis daŭrigi la kunlaboron kaj rilatojn kun ERA. Pri la dosiero niaj membroj estis informitaj en Sennaciulo.

Opinienketo: Laŭ la decido de la kongreso en Karlovy-Vary - la PK devis pli detale pristudi la respondojn al la Opinienketo. Komisiono kreita de la PK faris tion kaj aperigis siajn konstatojn en la maja numero de Sennaciulo. Tiuj konstatoj povos esti pridiskutataj dum la kongreso en Moskvo kun la alpreno de decidoj.

Manifestacio de 1-a de majo: Kadre de la Kampanjo 2000, la PK unue decidis organizi manifestacion okaze de la Unua de majo en Bruselo, sed, pro la malfacilaj kontaktoj kun belgaj sindikatoj, estis decidite ĉijare organizi tiun manifestacion en Parizo kaj venontjare en Bruselo. Ankaŭ pri tiu manifestacio aperis informoj en Sennaciulo kaj en la reto (vidu la raportojn en tiu ĉi Sennaciulo).

Afero Waldon : dum tiu ĉi periodo ni ne sukcesis havi novaĵojn pri la mortkondamnita kamarado. Tamen la PK decidis malfermi fonduson por helpi financi la apelacion . Ni daŭre alvokas ĉiujn personojn kiuj havus informojn pri tiu afero, sendi ilin al la SAT-sidejo.

Forumo pri E-Civito : paralele kun la SAT-kongreso en Karlovy Vary, samloke okazis Forumo pri E-Civito. Tiun ĉi forumon partoprenis reprezentanto de la Plenum-Komitato. Ĝis nun neniu informo oficiala de la organizantoj atingis SAT-sidejon .

Kampanjo 2000 - kadre de tiu kampanjo, la PK de SAT decidis kontakti diversajn internaciajn laboristajn instancojn kaj proponi kunlaboron. Ni sendis leterojn (dulingve: esperante kaj france) kaj alian materialon al C.E.S., C.I.S.L., B.I.T., C.I.S.C., A.I.T. Tiu temo devus esti pridiskutata en Moskvo (vidu Opinienketon). Neniu el ili respondis al ni.

Ankaŭ ĉi-jare la reprezentanto de SAT salutis la Universalan Kongreson de Esperanto en Berlino, partoprenis al la Kunveno de SAT-anoj dum tiu ĉi kongreso kaj ankaŭ la Maldekstran Forumon. La raportoj aperis en Sennaciulo.

Membraro :

Jam de kelkaj jaroj ni estas devigataj ripeti la saman konstaton. La nombro de niaj membroj daŭre ne estas kontentiga. Bedaŭrinde niaj membroj maljuniĝas kaj mankas al ni novaj. La membronombro daŭre tendencas malgrandiĝi kaj tio riskas endanĝerigi la ekziston de SAT. Kion fari? Ĉu la proponoj kaj ideoj el la Opinienketo povus helpi en la ŝanĝo de tiu tendenco? Dum la kongreso ni devas pridiskuti ilin. Kiel varbi novajn membrojn? Ĉu la ideoj de SAT ne plu aktualas? Ĉu vere oni ne plu bezonas laboristan neneŭtralan Esperanto-movadon? Ŝajnas ke niaj landaj perantoj ne plu sukcesas varbi al SAT. Same la LEA-oj. Laŭ la interkonsento de Gotenburgo pri la kunlaboro inter SAT kaj LEA-oj, la unua rolo de LEAoj estas la diskonigo kaj instruo de Esperanto kaj la dua varbado de membroj al SAT. Fine de E-kursoj, oni devus al la lernantoj prezenti SAT kaj proponi al ili aktivi en tiu tutmonda neneŭtrala laborista organizo. Pri tio oni devus diskuti dum la kunveno de LEA-komitato. Ni ĉiuj devas unuigi niajn fortojn por malebligi la malaperon de SAT.

Administrado :

En la funkciado de nia administrejo ne okazis ŝanĝoj. K-do Barkoviĉ daŭre laboras plentempe kaj plenumas ĉiujn laborojn : akcepton de klientoj kaj gastoj, informadon pri Esperanto kaj SAT, prizorgadon de membraro, sekretariadon, prizorgadon de retpaĝoj kaj ilian aktualigon, fakturadon, pakadon de libroj, transportadon al la poŝto, redaktadon kaj kontoregistradon. K-dino Sabatier, nia kontistino, venas unufoje semajne por fari sian parton de kasa kaj kontada laboro. Gekamaradoj Bannier, Querard, Hardy kaj kelkaj aliaj, ĉiumonate zorgas pri la ekspedo de Sennaciulo.

Kasa raporto - jaro 1999 :

(aperos en julia numero)

Rilatoj kun LEA-oj :

Niaj rilatoj kun diversaj LEA-oj estas daŭre bonaj, kvankam ili ne sufiĉe uzas siajn kolumnojn en Sennaciulo por informi nin pri siaj agadoj. La sukcesoj de iuj povus helpi kaj doni ideojn al aliaj. Do, estus bone ke en ĉiu LEA-o ekzistu persono kiu zorgus por regule sendi novaĵojn de LEA-o por aperigo en Sennaciulo. Rimarko: Dum la SAT-Amikara kongreso en Fouquieres-lez-Lens, Pasko 2000, aperis la ideo ke en ĉiu lando ekzistu nacilingva propagandilo afiŝebla sur la sindikataj tabuloj en la ŝtataj

kaj privataj entreprenoj.

Rilatoj kun TANEF :

Niaj rilatoj kun tiu Naturamika Internacio estas tradicie bonaj . Pluraj el niaj membroj estas ankaŭ membroj de TANEF.

Konflikt-Komisiono (K.K.) :

Ĝis la apero de tiu ĉi numero de Sennaciulo ne okazis konflikto en SAT, kiun oni anoncis al la Konflikt-Komisiono.

Ĝenerala-Konsilantaro (Ĝ.K.) :

Sekve de la lasta referendumo, estis elektitaj ok novaj Ĝeneralaj Konsilantoj, kiuj komencis aktivi ekde la 1-a de marto 2000. Ili unue devis organizi sin, elekti sekretarion, kiu havos kontakton kun la P.K. kaj interveni per konsiloj kiam tio necesos. La P.K. jam turnis sin al la konsilantoj por pristudi la problemon de nesufiĉa aliĝo al la kongreso en Moskvo, kio eventuale povus provoki la nuligon de tiu ĉi kongreso. Pro la komenciĝo de ilia laboro, ili ne povis sendi sian agadraporton.

Landaj Perantoj :

Kelkaj el landaj perantoj estas tre akurataj en la sendo de informoj pri la pagoj, novaliĝoj kaj forpasoj de niaj membroj. La aliaj tute ne. Jam plurfoje okazis ke kelkaj el niaj membroj ne plu ricevadis Sennaciulon, ĉar la peranto ne informis la sidejon pri la pago. Oni devas eviti tion, ĉar la poŝta sendo de mankantaj ekzempleroj multe kostas. Ni havas novan peranton en Kanado, kie nia kamarado Kuhl demisiis pro miskomprenoj. Ni tre bedaŭras lian eksiĝon kaj dankas pro la farita laboro, kun espero ke post pripenso li revenos al ni. La nova peranto por Kanado estas k-do Hans E. Ilginnis.

Sennaciulo :

Malgraŭ la regula invito al kunlaboro kaj demandoj starigitaj en la lastjaraj raportoj, alvenis preskaŭ neniaj reagoj viaflanke. La redaktoro, kiu cetere ne estas nur redaktoro kaj ne povas dediĉi sian tutan tempon al la redaktado kaj prizorgado de la gazeto, bezonas vian helpon por fari bonan kaj interesan Sennaciulon. Ofte la redaktoro aŭdis rimarkon: "Sennaciulo tute ne estas interesa gazeto". Do, kion fari? La redakcio bezonas aktualajn tekstojn pri la okazaĵoj en la mondo. Ne hezitu verki, eĉ kun gramatikaj eraroj, se vi estas komencanto. La redaktoro korektos la erarojn.

Vi sciu ke en la gazeto aperas artikoloj tiaj, kiajn ni ricevas. Dum la tuta jaro 1999, niaj membroj en Jugoslavio ne ricevadis Sennaciulon pro la interrompo de poŝtaj rilatoj kun tiu lando. Ĉiuj senditaj ekzempleroj revenis al ni. Pro tio ni decidis ke la lastjaraj kotizoj de niaj jugoslavaj gekamaradoj validu por tiu ĉi jaro. Tiuj, kiuj malgraŭ ĉio tamen deziras havi kolekton de la jaro 1999 bonvolu kontakti nin kaj ni sendos al ili la gazetojn Ni esperas ke ekde la komenco de la jaro 2000 la poŝtaj rilatoj denove funkcias kaj ke nun ili normale ricevas nian gazeton (neniu el ĉijaraj numeroj senditaj al Jugoslavio revenis).

Sennacieca Revuo :

Kiel suplemento de la ĉijara marta Sennaciulo aperis, kun prokrasto, la kajero 1999 de nia Sennacieca Revuo. Ĝi aperis kun multe da peno, pro la malagrablaĵo okazinta al nia k-dino Krys Bottrill, kiu perdis ĉiujn dokumentojn en sia komputoro kaj pro diversaj kialoj rezignis pri tiu posteno. La redaktoro de Sennaciulo, k-do Barkoviĉ, klopodis tamen aperigi ion, kaj la rezulton vi jam tenas en la manoj. La ĉijaran numeron 2000 preparos la nova redaktoro de S.Revuo, nia kamarado Mikaelo Scherm. Ni invitas ĉiujn, kiuj havas interesan materialon, tuj sendi ĝin al li. Se la aŭtoroj de perditaj artikoloj posedas ties kopiojn, bonvolu sendi ilin al la nova redaktoro.

Eldonoj, librovendado :

Ankaŭ en tiu ĉi periodo ni ne eldonis novan libron, ĉar ni devas ŝpari monon por la eldono de nova PIV, kiu kostos multe. Tamen, la tre interesaj SAT-eldonaĵoj kiel "Vualo de l'Silento", "La Fremdulo" kaj aliaj, daŭre kuŝas en la librostoko kaj atendas siajn legantojn, sed ili preskaŭ ne vendiĝas kaj transformiĝas al "morta kapitalo". Tio estas fakto kiu ne kuraĝigas nin al la eldonado, kvankam la edukado kaj klerigado estas la bazaj celoj kaj taskoj de SAT.

SAT kaj La Reto :

Tiu moderna komunikilo estas tre utila al SAT kaj ni multe uzas ĝin. Krom la TTT-paĝoj de SAT en kiuj ni provas regule informi pri la aktivecoj kaj organizformoj de nia Asocio, la tre utila reta servo estas la retpoŝto. Pere de ĝi ni ricevas la duonon de leteroj kaj mesaĝoj. Nun ni havas tri aktivajn retadresojn inter kiuj la plej facile memorebla estas la lasta: <sat@esperanto.nu>. Ankaŭ la aliaj du: <satesper@cybercable.fr> kaj <satesperanto@multimania.com> daŭre bone funkcias.

Filatela servo:

Same kiel lastjare, nia k-do Modesto Ramelli daŭre akceptas viajn belajn poŝtmarkojn kaj telefonkartojn, per kies vendo nia asocio ricevas iom da mono.

Broŝurservo de SAT :

Nia senlaca kamarado Baudé daŭre aktivas kaj eldonas interesajn broŝurojn kadre de la Broŝurservo de SAT. Inter la lastaj reeldonoj aperis «Vojaĝo al Kazohinio» kaj «Neĝulino». Pri ĉiuj novaĵoj kaj mendoj bonvolu turni vin rekte al : ESPERANTO, Cargue Sac, FR-47470 Beauville, Francio.

Amikeca Reto :

Tiu ĉi servo de SAT daŭre bone funkcias. Ĉiujn informojn kaj novaĵojn pri la Amikeca reto oni povas trovi sur la TTT-paĝoj de la reto ĉe la adreso: <http://www.creaweb.fr/ a.reto>

Junulfako :

Dum tiu jaro la Junulfako perdis du gravajn kunlaborantojn, unue la redaktoron, Julien Boesel, kiu foriris militservi, kaj poste la kasistinon, Lisa Bannier, kiu rezignis pri sia posteno kaj eksiĝis el la Asocio. Tial, la kunvenoj okazis, sed ne ĉiam en la sidejo kaj kun nombro de partoprenantoj foje tre malgranda. Bonŝance tamen k-do Antonio Cano akceptis esti la nova kasisto, sed necesus ke novulo akceptu redakti la revuon, ĉar nun k-do Vinko Markov devas zorgi pri tio, dum li jam plenumas la sekretarian taskon.

Kontentiga estas la fakto ke ĉi-jare aperis kvar numeroj de «La Juna Penso», sed okazis kelkaj problemoj por la sendado. Venis novaj abonantoj kaj novaj kunlaborantoj el pluraj landoj, inter kiuj estas Brazilio, kie nia peranto, k-do Fabricio C. Nepomuceno, sukcese klopodis trovi aktivulojn surloke, kaj sendis al ni multan interesan materialon.

La Junulfakanoj ankaŭ dufoje partoprenis en elsendoj de Radio Esperanto, kiun prizorgas ĉiuvendrede kelkaj kamaradoj en la kadro de parizregiona liberecana radio, kie ankaŭ estis anoncitaj la kunvenoj.

Krome, la Junulfako akceptis en unu kunveno, okazinta en la SAT-sidejo, neesperantistajn junulojn, kiuj tiam estis informitaj pri Esperanto kaj pri la utileco de SAT por la progresemuloj. Plie, junulfakanoj ĉeestis en diversaj esperantistaj aranĝoj, sed neniam sukcesis tie varbi novajn aktivulojn. Kiam, kaj tio vere ne estas ofta, ĉeestis junuloj, ili ĉiuj jam aktivis ĉe la neŭtraluloj.

Resume, nuntempe estas eblaj multaj aferoj, ekzistas mono en la kaso, multaj propagandiloj, kunvenlokoj, pli aĝaj membroj kiuj pretas helpi nin, organo regule eldonebla, nur mankas....la junuloj! Preskaŭ estas nun kutimo alvoki la membraron al pripensado por solvi tiun krizan situacion, sed vere necesus ke ĉiuj klopodu konsciigi la junulojn kaj aliajn ke SAT estas absolute necesa organizo por ĉiuj kiuj volas kune kleriĝi kaj pripensi kiel plej bone agi per Esperanto por socia progreso sur tutmonda skalo. Kaj tio verŝajne estas pli utila ol provi ŝanĝi statuton kiu estas tute taŭga.

Vinko Markov

Frakcioj :

Nur de tempo al tempo kelkaj el niaj frakcioj uzis en Sennaciulo siajn kolumnojn por informi nin pri sia agado. Tamen, ĝenerale ili malofte tion faris, kio estas bedaŭrinda, kaj ni esperas ke dum la venonta periodo ni estos pli bone kaj pli ofte informitaj pri la aktivecoj de niaj frakcioj.

Kongresoj :

Esperante ke nia estonta kongreso en Moskvo povos okazi malgraŭ la nesufiĉa nombro da aliĝintoj, ni jam havas lokon kaj datojn de la venontjara kongreso, kiu devus okazi de la 14-a ĝis 20-a de julio 2001 en la hungara urbo Nagykanizsa. La tiea OKK jam faris multajn preparlaborojn kaj la kongreso estos certe tre sukcesa, ĉar ĝi havas grandan subtenon fare de la urbestraro. Krome, ĝi troviĝas je ne tre granda distanco de la kroata ĉefurbo Zagrebo, kie tuj poste okazos venontjara Universala Kongreso. Estos organizita komuna vojaĝo por tiuj, kiuj deziros partopreni la U.K. Por la jaro 2002 jam estas antaŭvidita kongreso en Hispanio.

Konkludo :

Jen la superrigardo pri niaj aktivecoj inter la du kongresoj. Bonvolu do voĉdoni pri ĝi.

Denove ni atentigas, ke ekde la kongreso en Karlovy Vary oni ne plu laŭtlegas la jarraporton dum la kongresa laborkunsido. Bonvolu do, antaŭ la alveno al la kongreso, atente legi ĝin kaj fari notojn pri la temoj pri kiuj vi volas interveni.

Sesdek procentoj

Belgio havas la plej multajn sindikatistojn en Eŭropo, diris la ĵurnalisto, kiu legis la novaĵon sur la ekrano de mia televido. Oni faris komparon kun la aliaj landoj de Eŭropo kaj procente Belgio havas pli da sindikatistoj ol la najbaraj landoj. Diri ion ne plu sufiĉas dum la nuna tempo, oni devas, por pravigi sin, montri bildojn ĉu ne, do la ĵurnalisto rapide aldonis ke "ni iras eksteren por babili kun kelkaj homoj en la laborejoj».

"Ĉu vi membriĝis en sindikaton ?", la ĵurnalisto ekster la studio demandis al virino. "Komprenble", la virino respondis. Nun vi komprenas ke la ĵurnalisto devas starigi inteligentan demandon, pro tio, "kial"! La virino ne hezitis kaj kapablis tuj respondi, "estis la kutimo de la hejmo kiun mi transprenis, mia patro estis sindikatisto, la onklo"! Alia persono respondis: " estas facila por ĉio"! Re al la studio, la afero estis klara, la Belgoj ne nur amase aliĝas al sindikatoj sed ankaŭ estas ege konvinkitaj.

Kial la Belgoj tiel amase aliĝas al la sindikato?

Nur en Belgio la sindikatoj pagas la senlabormonon al la senlaboruloj. Pro tio ili ricevas sumon de la ŝtato, kiu ne nur zorgas ke ili facile povu fari tion, sed je la fino de la tago eĉ ŝparas iom de moneroj al la afero. En Belgio oni ne aliĝas al sindikato pro konvinko sed por facile ricevi senlabormonon. Tial nun oni atingas tian altan membrecon, precipe nun kiam la tempo multe pli bonas ol antaŭ 10 jaroj. Same kiel en la najbaraj landoj (kaj la cetero de la mondo) ankaŭ Belgio suferis krizon en la ekonomio. Oni, pro la "belga kulturo", timis elspezi monon. Monon oni ne elspezas por sensignifaj aferoj kiel ekz. sindikato, sed oni metas sur bankkonton por havi iam sufiĉe da mono por konstruigi domon. La tempo ŝanĝiĝis al iom pli bone kaj la timo por perdi laboron malkreskis. La danĝero daŭre ekzistas sed la nova registaro faras alian propagandon: "Ni nun vivas en periodo de kresko"blekas nia ĉefministro. La laboristoj malpli timis, sed por sekurigi sin kontraŭ estonta danĝero oni decidas aliĝi al la sindikato. El konvinko!!! Forgesu karaj amikoj. Simple pro la sistemo kiu helpas vin kiam vi tamen pro dia (aŭ majstra) volo perdus laboron.

Eble la k-doj en la najbaraj landoj aŭdis la propagandon de la belgaj sindikatoj. Mi petas pardonon karaj amikoj sed la cifero estas same malvalora kiel la sindikatoj en la lando de vafloj kaj bona ĉokolado.

La sindikatoj en Belgio (kaj mi timas en la cetero de la mondo) iĝis strukturo kiu nur prizorgas la bonon de la gvidantaro. Batalpretaj la sindikatoj entute ne plu estas, sed ja pretaj por komerci pri proletaj postenoj. Oni negocas pri postenoj.

"Kiom da laborantoj vi intencas maldungi sinjoro estra moŝto"? 5000, ĉu ni ne povas aranĝi ion por ke nur 4500 devu perdi laboron? Ho, nur 3000 nun, jes bone estimata moŝto, ni parolos kun la kanajlaro kiu profitas vian monon. Ne timu sinjoro nobla moŝto, ni konvinkos ilin. Se necesas kun la sklavaro de la kapitalismo, la ĝendarmoj, jes, tiuj ĉiam pretas subteni la agadojn de la granda kapitalo, la diktaturon aŭ la ekstremdekstrularon. Kiam ĝendarmoj draŝos la kapojn de la proletoj ili rapide obeos vian saĝan decidon"!

Eĉ la plej famajn sindikatojn mi ne plu fidas. Strukturoj kie la salajro de la gvidantaro dependas de la ekzisto aŭ malapero de la strukturo ne povas esti bona organizo. 90% de la anoj de la Belgaj sindikatoj aliĝis el oportunismo, ne el konvinko. Sindikatismo ne venu el strukturo sed el momento de batal- kaj agadneceso. La sindikatoj propagandas siajn proprajn necesojn kun falsaj diroj, ke sen la sindikatoj la granda kapitalo detruus ĉiujn rajtojn de la proletaro. Kia mensogo.

60% de la belga aktiva popolo aliĝis al sindikato! Kredu min karaj kompanoj, Belgio estas unu el la plej malsindikataj landoj el tuta Eŭropo (kaj el cetera mondo). La cifero signifas nenion krom la fakto ke, ricevi senlabormonon estas multe pli facile kiam vi estas ano de la sindikato, ol kiam vi devas direkti vin al la ŝtata strukturo kio estas vera ruiniĝo. Estro de la sindikato estas la plej bona ŝtupo al bone pagita posteno kiel politikisto en partio, kiu eĉ ne defendas la rajtojn de la laboristoj.

Jakvo

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta,

FR-75020 Paris

Tel: +33.1.47.97.87.05, Fax: +33.1.47.97.71.90

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke en la jaro 2000 ni povos eldoni ĝin.-Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko "Por la Fonduso de Nova PIV".
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

FONDUSO NOVA PIV
Anonime 300,00 FRF; Brandenburg 60 DEM; anonime 2000 FRF;

HELPO AL LA ASOCIO
En Hispanio (ESP) J. Moragues 500,00; J.M. Lopez Gonzalez 300,00; J.A. Fleta 500; J. Pere 500,00;
En Francio (FRF) anonime 500,00;
En Germanio (DEM) Conzeth 5,00; Eberspächer 5,00; Knoeferl 5,00; Böhringer 5,00;
En Aŭstrio (ATS) Hollinger 360,00

VIVO EN LITOVIO

Serĉo de vero - sub radoj de Prezidenta limuzino

La 29-an de marto, 56-jara Kaunasanino Ina Miŝeikiene, ĵetis sin sub la radojn de polica aŭtomobilo "Volvo S70", kiu akompanis aŭtomobilon de litovia prezidento.



Antaŭ ol salti sub radojn de aŭtomobilo, ŝi malfermis afiŝon, kie estis enskribitaj akuzoj kontraŭ ŝtata juĝa sistemo.

La virino estis vundita kaj transportita al la hospitalo kun rompita osto de ŝia brako.
«Saltante sub radojn de prezidenta kolono, mi volis altiri atenton al la fakto, ke en la lando ne funkcias justico». Prezidenta aŭtomobilo ne haltis. La virino asertis ke ŝi decidis fari tiun drastan paŝon nur post longaj malsukcesaj provoj liberigi sian kondamnitan filon per juĝa rimedo.
"Se necesos, mi ne nur ĵetos min sub la radojn de aŭtomobilo, sed mi bruligos min en la korto de Prezidentejo. Eble mia morto altiros atenton de la socio" - ŝi diris.
La ŝtatprezidento opinias, ke tiaj strangaj kaj senpripensaj agoj ne sukcesos atingi la deziratan rezulton. Ĉiu civitano havas rajton turni sin al Prezidentejo kaj per civila maniero klarigi siajn problemojn.

Senpaga juĝa helpo por malriĉuloj kaj mizeruloj

En aprilo, en Litovia urbo Ŝiauliai estis malfermita kiel unua en centra Eŭropo, Publika kontoro de advokatoj. Fondon de tiu instanco iniciatis malfermita Litova Fonduso kaj Ministrejo pri justico. La ŝtato akceptis kiel devon doni senpagan juran helpon al malriĉuloj kaj mizeruloj en krimprocesoj. Evidente, ili ne havos la plej bonan helpon, sed la advokatoj estos kvalifikitaj. Unuan juran helpon ricevos loĝantoj de la urbo Ŝiauliai, sed estas evidente ke tia jura helpo estas necesa en ĉiuj urboj de la lando.

Leonarda G.

UNUA DE MAJO 2000 EN PARIZO

La legantoj de Sennaciulo jam legis pri la partopreno de SAT al la kampanjo 2000. Post la instigo al multaj progresemaj asocioj uzi Esperanton, la decido organizi komunan manifestacion okaze de la Unua de majo efektiviĝis en Parizo. Malantaŭ granda banderolo (vidu foton) kies titolo estis "ESPERANTO - la langue internationale pour les travailleurs" (Esperanto - internacia lingvo por laboristoj) - grupiĝis membroj de jenaj sindikatoj, asocioj kaj lokaj grupoj:

- CGT - Ĝenerala Konfederacio de la laboro
- CNT - Nacia konfederacio de laboro
- FEN - Federacio por nacia edukado
- SAT-Amikaro
- Franca Fervojista Esperanto-Asocio
- Naturamikoj
- SAT-Junulfako
- JEFO - Junulara Esperantista Franca Organizo
- Bondy Esperanto-grupo
- Esperanto 94
- Universalista movado



Aliaj kunportis propran standardon:

- FET - Esperantista Federacio de laboro
- SAT-Frakcio por disdona ekonomio

Entute, ĉirkaŭ 70 esperantistoj kiuj devis enmiksiĝi al granda procesio (40.000 partoprenantoj) laŭvice en lastajn rangojn, sed, pro longa atendo sub fortaj sunradioj ili akceptis lokon meze de la CGT-procesio. Inter la Placo de la Respubliko kaj Placo de Bastilio 5000 flugfolioj estis disdonitaj al la publiko, kiu neniam aŭ malmulte aŭdis pri Esperanto.





Tiu tago de komuna agado kun parizregionaj esperantistoj (kelkaj venis el foraj regionoj):

1. permesis, estante bone vidataj, taŭge informi pri Esperanto (multfoje la publiko mem petis informilojn)
2. montris ke konkretaj agadoj estas efikaj
3. konfirmis ke agado baziĝanta sur difinita kaj bone preparita temo interesas multajn, favoras kaj plibonigas la kontaktojn.
4. Reliefigas la neceson prezenti nian movadon al la neesperantistaj fratorganizoj: socialaj kaj kulturaj, laboristecaj kaj pacemaj.

Mi esperas ke venontjare, pli impona procesio partoprenos la 1-an de majo en Bruselo.

Guy Cavalier

NEKROLOGO

Vendrede, la 19.05.2000 forpasis en Parizo, nia malnova membro, k-do

Raoul BULCOURT
(matr. 21.710)

Dum longaj jaroj li estis revizoro de niaj kontoj kaj ĉiam materia subtenanto de nia asocio. Ni kondolencas al liaj amikoj.

Atentigo:

Tiuj gekamaradoj, kiuj erare ricevis **aprilan** Sennaciulon anstataŭ **maja**, bonvolu informi nin. Ni sendos la majan al ĉiuj, kun pardonpeto pro tiu eraro.

73-a Kongreso de S.A.T. en Moskvo - Rusio 15-23.07.2000



Organiza Kongresa Komitato:
Prezidanto: Nikolao GUDSKOV, a/k 57, RU-105318 Moskvo. Tel.: 00.7.095.369.42.20. (hejma), e-poŝto:<nikolao@orc.ru>
Sekretario-kasisto: Mikaelo ĈERTILOV, a/k 21, RU-143000 Moskvo-odincovo-6. tel/fakso: 00.7.095.243.74.56.
e-poŝto: <mikaelo@esperanto.nu>.

Kotiztabelo (ĉiuj prezoj en Francaj Frankoj (FRF) kaj €)

Kategorio	31.05.200	poste
SAT-membro	430 FRF/66,55€	500 FRF/76,22€
SAT-geedzoj	690 FRF/105,19€	800 FRF/121,96€
SAT-gejunuloj	215 FRF/32,78€	250 FRF/38,11€
nemembroj de SAT	530 FRF/80,80€	600 FRF/91,47€
geedzoj, SAT-nemembroj	840 FRF/128,06€	950 FRF/144,83€
gejunuloj, SAT-nemembroj	285 FRF/43,45€	330 FRF/50,31€

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❏ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❏ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 40% rabaton.
- ❏ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 60% rabaton.

LISTO DE ALIĜINTOJ AL LA KONGRESO

Bonvolu atenti: La OKK surloke donos al ĉiu lian kongresnumeron. Ĉi tie ni aperigas alfabetan liston de tiuj kiuj aliĝis ĝis la 23-a de majo.

Baert Eric (BE); Barkoviĉ Kreŝimir (FR); Bouchet Rémy (FR); Bustin Martin (FR); Cibulevskij Dmitrij (UA); Charlot Vincent (FR); Cvetkova Valeria (RU); De las Heras Jesus (ES); De Weerd Stella (BE); Geoffroy Guy (FR); Goreckaja Halina (RU); Hardy Marcel (FR); Heinze Bernie (AU); Hollinger Maximilian (AT); Kalinkina Natalia (UA); Kessous Djemil (FR); Kessous Michelle (FR); Kiselova Olga (RU); Knuchel Charly (CH); Korĵenkov Aleksander (RU); Korĵenkov Aleksej (RU); Letzgus Geneviève (FR); Maziy Liya (FR); Muĥamedŝina Tatjana (UA); Natin Andris (RU); Opulskiene Graĵina (LT); Pasiecka Urszula (PL); Patrin Gilles Marcel (FR); Persson Pelle (SE); Peyraut Yves (FR); Popova Jekaterina (UA); Popova Tamara (UA); Quillaud Pierre (FR); Rigault André (FR); Rigault Louise (FR); Sanajeva Elena (RU); Skvortsova Natalia (RU); Stuppnig Martin (AT); Ŝuvajev Timofej (RU); Thollet Marc (FR); Thollet Renée (FR); Toubale-Hadjeres Yacine (FR); Toubale Franciska (AU); Vignal Simone (FR); Vulfoviĉ Leo (RU); Westermayer Manfred (DE); Yamasaki Seiko (JP);

Ni esperas ke pluraj aliaj gekamaradoj aliĝos eĉ lastmomente por sukcesigi tiun ĉi nian kongreson. Ni ripetas la lastmonatan informon pri hotelo Sevastopol ĉi sube :

La OKK trovis tiun ĉi hotelon «Sevastopol» kie ni ĉiuj povus loĝi kune. Ĝi estas sufiĉe komforta kaj ne tro multekosta. Dulita ĉambro (ĉu por unu aŭ por du personoj) kostas nur 15 €. Malgrandaj unulitaj ĉambroj kostas 12 €. Matenmanĝo por unu persono kostas 2,5 €. Do, unu tagnokto kun matenmanĝo, por unu persono loĝanta en dulita ĉambro (do kun alia) kostas 10 €. Ĉiu ĉambro havas apartan necesejon kaj banĉambron kun bankuvo, telefonon, televidilon kaj fridujon.

VIAJ REAGOJ ...

AL GARY MICKLE KAJ ALIAJ SENNACIISTOJ

Ne estas mia intenco reeniri en polemikon pri sennaciismo-sennacieco. Mi nur klarigas, ke pro la "protesto" de Jürgen Kuhl (S-ulo nov. 99-paĝo 128) kelkaj braziliaj SAT-membroj, malaprobe reagis. Mi provis trankviligi ilin kaj decidis sendi leteron al Kuhl kun iom da "malvarma akvo" (vidu poste). Kiel SAT-peranto mi sendis kopion al SAT-sidejo, sed ne petis publikigon, la apero(S-ulo jan. 2000-paĝo 7) estis entute sub la iniciato de la redakta komitato.
Post la argumentado de Gary (S-ulo marto 2000 - paĝo 32), mi ne vidas, mi kiel "kosmopolito", kiel iu sennaciisma sistemo, kiu, jes laŭ Lanti, devus "batali kontraŭ ĉio nacieca" povus instaliĝi sen ŝtata aparato, se ne nazia, almenaŭ faŝisma. Detruado neniel konstruas.
Por ne longigi tiun reagon, mi tamen plezure komunikas al tiuj, kiuj eble scivolas pri tio, mian reputacion de marto 2000. Aldo de Giorgi en "La Kancerkliniko" malkovris ke mi estas "ikonoklasto". Pro tiu kvalito (malkvalito) mia, mi devis lasi la redaktadon de "Liberecana Ligilo". Giulio Cappa en Esperanto, paĝo 53, deduktis, ke mi apartenas al "forte minacata kultura malplimulto: tiu de la kosmopolitoj..." - Sen "etnisma" ebrieco. La SAT-eca PIV tiel difinas la vorton kosmopolito: "1) Homo, kiu rigardas la tutan mondon kiel sian patrujon; mondcivitano, homarano". Kaj mi rajtas aldoni, ĉu tio ne estas iom pli ol simpla sennaciisto?
Paul Gubbins en Monato, paĝo 31, atentigas, ke mi estas el la malmultaj aŭtoroj, kiuj priverŝas leganton per malvarma akvo. Mi fakte opinias, ke la stultaj homoj (...ĉu tio estas insulto?) bezonas multajn, multegajn duŝojn per malvarmega akvo antaŭ ol ion percepti aŭ konscii. Sed jen en SAT de longe oni ne povas surverŝi malvarman akvon, sed mi faras tion aliloke!
K-do Gary, mi ŝatas vian sugeston, ke en SAT oni adekvate traktu la aferojn de Nova Dekstrularo aŭ "etnoplurismo" sendube ankaŭ tra la klara, facile komprenebla "Manifesto de la Sennaciistoj" de E. Lanti kaj kun komparo al la tre komplika, konfuza, aktuala, 11-paĝa densa artikolo de Zlatko Tiŝljar sub la titolo: "Eŭropa ideologio" de Sennacieca Revuo" n° 127-jaro 1999. Tie oni retrovas maskitaj, ĉiujn principojn de la akraj naciismoj kaj patriotismoj kun amo, amego...al la naskiĝloko. Jen malvarma akvo!

G. Ledon

*****

PRI SAT-UEA RILATOJ KIAL MI NE KONSENTAS KUN JÜRGEN KUHL

Rememorigo. Kdo Kuhl, SAT peranto por Kanado, postulis la eksigon de Kep Enderby el SAT (Sennaciulo, novembro 1999). Tion ne akirinte, li eksiĝis.

Kiel Kuhl, kiel Lanti, mi estas sennaciisto, almenaŭ tiel mi sentas min. Mi ne konsentas kun Gilbert Ledon, kiu asertas ke la *Manifesto de la Sennaciistoj* estas « preskaŭ same nazia kiel la *Mia Lukto* de Hitlero » (*Sennaciulo*, januaro 2000). Eble, aperigante tiun tekston, Lanti (ankaŭ liaj ge-kdoj de la sennaciista frakcio de SAT) estis mallerta. Certe li troigis sian opinion, volante *tordi la bastonon al la kontraŭa direkto.* Tion li faris ĉar, en 1931, li jam estis vidinta la krimojn de la naciistoj ; kaj li ne ankoraŭ ĉion vidis. Hodiaŭ ŝajnas ke, la gurditajn traŭmatizajn lecionojn de la XXa jarcento, oni ankoraŭ ne ellernis, eĉ en Esperantujo. Ĝis nun, ĉiuj krimoj de tiu freŝdata historio, ĉie, estis far naciistoj. Vidu, sub la masko de « socialismo » aŭ « komunismo », ne nur en Nazia Germanio, sed ankaŭ en Sovetunio, en Kamboĝo kaj en multaj aliaj landoj (eĉ en Francio) : ĉie, vi trovos, fakte, ***naciistojn***. Kiu estas la komuna punkto inter la « socialismo nacia » de Stalino, Pol Pot, ktp, kaj, aliloke, la « naci-socialismo » de Hitlero kaj Musolini ? Tio ne povas esti la socialismo, neebla en unu sola lando, nur mondskale; tio estas la ***naciismo***, naciismo de la perdintoj paroksismigita de alia naciismo, tiu de la gajnintoj : la grandaj regnoj, la tiel nomataj « evoluintaj landoj », kies naciismo estas, ekstere, iom pli glata, pli milda. Ĉie, ĉiuj ŝtatoj, ĉiuj ŝtatuloj, zorgas nur pri siaj naciaj interesoj (kiam ili ne zorgas pri interesoj plie apartaj). Jen kial la grandaj regnoj daŭre turnis la tutan mondon en fajron kaj sangon. Ĉu necesas memorigi tiujn profetajn vortojn de Zamenhof : « *Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti : krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj - kiel natura sindefenda reago - estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj ; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas ne nobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta,* ***ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian****, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiu la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala* » (skribitaj en junio 1914, kaj senditaj al siaj samgentanoj de la Hebrea Ligo)? La sennaciistoj radike kontraŭas tiun koncepton, kaj ĝis nun, je mia kono, ili ne kulpas pri krimaj agoj..
Kiel Lanti, ankaŭ, mi estas *supertendencisto* (aŭ *superpartiano*), kaj ŝajnas ke kdo Kuhl ne estas tia. Mi estas eĉ pli supertendencisto ol Lanti, sed li havis iajn kialojn. Tion, mi klarigu. Ne nur la homoj, ankaŭ la asocioj, suferas, dum sia vivo, ***kreskan krizon***. Tiu malagrabla fenomeno, tamen permesas ke oni certigas sian personecon, forĝas ĝin. En tiu kruca periodo, oni devas ***lukti***, ekstere kontraŭ aliuloj, ankaŭ interne. Tiel SAT, iam, devis kontraŭbatali, interne iajn tendencojn tro ekskluzivaj, ekstere iun neŭtralismon. UEA ankaŭ, havis kreskan krizon, Esperantujo entute havis kreskan krizon... Tiun stadion, bedaŭrinde, kelkaj homoj, aŭ asocioj, ne povas transpasi ; dum la resto de sia vivo, ili vegetas, iafoje sinmortigas. Feliĉe, dank'al Lanti precipe, SAT transpasis tiun gravan stadion. Certe, ĝi ne bone fartas hodiaŭ ; sed ankaŭ aliaj asocioj, ekzemple UEA. Tio ne konsolu nin. Tamen, kelkaj signoj, ekzemple Interreto, elmontras ke Esperantujo ne tro malbone fartas.
La malbonfarto de SAT (i.a.) estas, unue, la rezulto de eksteraj cirkonstancoj. Nuntempe, post la fiasko de laŭdira socialismo (aŭ komunismo) kaj la tutmonda (kaj provizora) venko de la liberala sistemo, ĉiuj asocioj, kiuj celas homan emancipadon, fartas malbone. Sed, tiuj objektivaj cirkonstancoj ne estas solsolaj, ĉar ni partoprenas en ili. Do, ekzistas ankaŭ *subjektivaj cirkonstancoj* : ni, nia konduto, niaj konceptoj, nia kapablo ilin kontesti, ***kontesti nin***. Kompreneble oni ne povas kontesti la eksteran mondon se oni ne kapablas, unue, iom dubi pri si. Ni plivastigu tiun problemon. Kiamaniere oni povos starigi tuthoman ***fratecon***, almenaŭ minimuman, se oni ne kapablas - minimume - konduti kiel ***fratoj*** inter si? Kiamaniere oni povos lukti kontraŭ ***eksigiteco*** se oni ***eksigas*** unuj la aliajn ? Kiamaniere oni povos allogi junulojn se oni limigas siajn agojn en senfruktaj polemikoj. Kiamaniere oni povos ***konvinki*** la aliajn se oni ne havas minimumon da ***konvinkoj*** ? Kiamaniere oni povos pruvi la vivpovon de la granda homa ***kunlaboro***, kiun ni konfuze antaŭsentas, se oni ne kapablas ***kunlabori*** inter si ?
...Ktp. Ni estas tro malmultnombraj (vidu *Esperanto sen mitoj*, Sikosek pravas, ni ne estas milionoj). Se oni ne volas morti, oni nepre devas vastiĝi : mense, age, materie, interkomuniki, kunlabori... Do mi ĝojas ke la SATano Kep Enderby fariĝis prezidanto de UEA. Mi ankaŭ ĝojas, ke alia SATano, Petro Chrdle, aniĝas en la estraro de UEA. Mi ĝojas kiam mi legas en *Esperanto*, la UEA-a revuo, reklamon por *Sennacieca revuo*. Mi ĝojas kiam mi aŭskultas Yvo Peyrault en la UEA kongreso en Berlino, aŭ kiam mi partoprenas en SAT

rondo dum la sama kongreso. Mi ĝojas ke ekzistas, ekzemple, Interasocia Franca Komitato de Esperanto, aŭ interreta rondo por ĉiuj esperantistoj en la Pariza regiono. Ĉie kaj ĉiel ni devas ankoraŭ plivastigi tiun tendencon, tiun movon, ĉiugrade : de la loka ĝis la universala. Ekzemple, mi ŝatus ke ekzistu, se ili ankoraŭ ne ekzistas, Franclingvana Esperanto-Interasocio (E.I.), Hispanlingvana E.I., Arablingvana E.I., ktp... Mi ŝatus ke oni ne limigu, loke, siajn agadojn en interretaj rondoj sed, ke ĉie oni laboru kune. Je ĉiu grado, ĉiu grupo, gardante sian personecon, povus partopreni en tia kunordigado de la esperantista agado. Ekzemple, mi freŝdate skribis al kdo Marco Botella (la verkinto de *Lirikaj perloj de Al-Andalus*, mirinda libro), ke estus bonega afero *iniciati grandan mediteranean asocion*. Tiu asocio povus koncerni ĉiujn popolojn loĝantajn ĉe Mediteraneo. Ĉirkaŭ tiu maro, estas riĉega historio, estas ankaŭ, kiel en Bialistoko sed je pli granda skalo, multe da malamikaj gentoj : eks-jugoslaviaj, grekaj, turkaj, palestinaj, katolikaj, judaj, ortodoksaj, koptaj, arabaj, berberaj, ktp... Oni eĉ povus loki la asocion en la centro de nia maro : en Malto, kie estas nun vigla esperantista asocio... Vidu, nek la homoj, nek la ideoj, mankas ; nur iom da volo, iom da imago.
La du projektoj : Zamenhofa (prefere spirita), kaj Lantia (prefere materialista), ne kontraŭstaras unu la alian ; ili sin kompletigas. La du antaŭvidas la homan emancipadon, alivorte la homan maturecon. Sed antaŭ tiu stadio, verŝajne devos okazi la matureco de Esperantujo.
Tiucelen, ni devas strebi. Ek al la laboro !

Ĝemil Kesus, SATano n° 35360 (aniĝis en 1998), ankaŭ UEAano (aniĝis en 1999, sed mi mislokis mian numeron).

P.S. Iu Kdo, kiu freŝdate eksiĝis el SAT, ĉar li trovis Sennaciulo-n tro kontraŭserba, realiĝis, vidinte ke la eksigo ne estas bona solvo. Kdo Kuhl postulis la eksigon de Kep Enderby kaj, poste, eksiĝis. Mi petas lin, ke li realiĝu, tio estus almenaŭ, nur por kunlabori kun kelkaj ge-kdoj en la sennaciista frakcio, kiu, nuntempe, malbone fartas. Vidu la finon de nia Manifesto : nek SAT, nek ĝia sennaciista frakcio, devas esti sekto « fermata al ĉiuj internaciistoj » (des pli ke tiuj internaciistoj estas la plimulto, 3a eldono, p. 43). La fizikisto Max Planck skribis tion : « Nova vero, en scienco, neniam suksecas triumfi, konvinkante la kontraŭulojn, kaj alkondukante ilin vidi la lumon, sed prefere ĉar, laste, tiuj kontraŭuloj mortas kaj nova generacio kreskas, al kiu tiu nova vero estas kutima » (Scienca Aŭtobiografo, 1948). Tiu aserto estas vera, ne nur en scienco sed ankaŭ en la tuta socia vivo, interalie en politiko, sed ĝi estas nur parte vera, iom severa. Nur la stultuloj neniam ŝanĝas sian opinion...

*****

Kia estas la diferenco inter la diversaj subpremantoj?


K-do Charlot skribis en letero aperinta en S-ulo 1138 (paĝo 47) kial li preferas ne iri al la SAT-kongreso en Ruslando. Mi pensas ke por komunisto ne estas facile skribi tiun leteron, sciante ke Ruslando iam estis la promesita lando de la komunista penso. Konsciaj homoj ne vizitas landon kie oni propagandas militon por gajni la baloton, konsciaj homoj ne vizitas landojn en milito, konsciaj homoj ne vizitas landojn kie oni subpremas la indiĝenan popolon. Konkludo: ne plu eblas fari SAT-kongreson ie ajn.
Dum ege mallonga periodo mi intencis organizi SAT-kongreson en Flandrio, se eblas en Antverpeno aŭ eble en alia urbo de la federacio. Imagu ke mi trovus la fortojn kaj kapitalon por helpi min. Imagu ke en la venonta baloto Vlaams Blok, la ekstremdekstra partio, havu tiom da voĉoj, ke ili regu en Antverpeno. Estas nur hipotezo ĉu ne, ĉar mi ne organizos SAT-kongreson. Sed imagu, ke mi donis mian plenan forton kaj energion por organizi kongreson pri kiu oni neniam antaŭe scias ĉu ĝi estos sukcesplena. Mi mendis salonojn, hotelojn, organizis interesajn turismajn aranĝojn kaj Vlaams Blok, partio kiun mi pli kontraŭbatalas ol la aliaj, gajnas la balotadon. Estus evidente, ke konsciaj homoj skribus al mi; pardonu min, karega k-do, sed post la ŝanĝoj de via registaro de "demokrata" al "netolerema" sistemo, mi preferas ne partopreni al via aranĝo.
Jes mi certe komprenus tion, ke mi havas k-dojn tiel konsciajn. Ĉu ne ankaŭ mi estas kontraŭ tiu aĉa politika sitemo? Mi preskaŭ certas ke k-doj Bespalov kaj Gudskov same kiel k-do Charlot malŝatas militon, ne nur en propra lando sed ie ajn. Problemo estas nur, ke ili intencis organizi SAT-kongreson en Moskvo. Fakto ankaŭ estas, ke la OKK (laŭ informo de k-do Charlot) kondamnas la militon en Ĉeĉenio.
Mi laboras jam de 40 jaroj por judoj (kapitalistaj judoj por esti preciza). Kiam mi aŭdis, ke UEA akceptis, ke oni organizu Universalan Kongreson en Israelo, mi tuj komencis serĉi informon pri la brutaleco de la Izraela registaro kontraŭ la indiĝena popolo de la iama Palestinio. Mi terure koleris kaj furiozis, ke UEA sendiskute akceptis, ke Universala Kongreso okazu en la lando, kiu por mi estas la mondofenestro pri maltoleremo (notu ke mi entute ne estas aktiva membro de UEA). Dum kelkaj semajnoj mi kolektis informojn, eĉ preskaŭ freneziĝis, kiam mi legis aferojn tiel kruelajn ke vi ne povas imagi, ke tiuj okazis en lando kie la plejmulto de la loĝantaro havas familianojn kiuj iam suferegis sub la plej hontaj agoj kiuj povas okazi en la mondo. Dum tiu periodo mi havis regule kontakton kun judino el Italio. Pro hazardo, ankaŭ en la sama periodo, kontakton kun kelkaj personoj de la sidejo de UEA en Rotterdamo, kaj iun tagon mi forŝiris ĉiujn paperojn kiujn mi havis pri Izraelo (kvankam mi jam azene tradukis). Mi konkludis, ke la organizantoj, feliĉe, ne kulpas pri la misfaroj de la registaro. Evidentas, ke UEA facile povas kaŝi sin malantaŭ la idiota vorto "neutrala", sed same SAT havas en sia statuto la diron, ke la asocio:" ne estante partipolitika (politike sendependa, do??) sed nur kleriga, eduka, kultura organizo—Do oni povas diri ke UEA ne havas intereson en la politikaj misfaroj de iu ajn lando. Pro tio ĝi povas kunveni en ĉiu loko de la mondo kaj male SAT, ne estante partipolitika, tamen devas doni sian opinion (kleriga eduka) pri la loko kie okazas la ĝenerala kunveno.
Ne plu eblas trovi sekuran lokon en la mondo kie oni povas organizi SAT-kongreson pro politika kialo aŭ Universalan Kongreson, kiam la neŭtrala UEA almenaŭ respektas homajn rajtojn. Aplaŭdinde por mi estas, ke la organizantoj de la SAT-kongreso kuraĝas kondamni la fiagojn de sia registaro, ke ili montras, ke ili ne akceptas militojn aŭ misfarojn. La demando ankaŭ estas: kian normon ni uzu por akcepti lokon A kaj ne lokon B?
Mi pensas, kaj mi jam diskutis pri tio kun aliaj gek-doj, ke ni devas akcepti ke, pro evoluo en la konscio (scio?) de la homoj, ni apenaŭ povas trovi lokon por kongresi. Ĉu SAT devas serĉi alian manieron por fari sian jarkunvenon (kiu la kongreso fakte estas), aŭ ĉu ni simple akceptas ke LA ideala loko ne plu ekzistas kaj ke ni devas kontenti kun la proponitaj lokoj kiuj anonciĝos.
Mi mem ne povas partopreni al la kongreso, sed faras ĉion por propagandi ĝin en la regiono kie mi estas peranto. Kompreneble mi ne kritikas la decidon de mia k-do Charlot ne iri al la kongreso. Unu aferon mi tamen ne akceptas, la kritikon ke S-ulo konstante kritikas "la komunistoj"n. Se li nur scius kiom da peno kostas al mi konvinki la homojn en Belgio, ke SAT ne estas komunista organizo, li eble neniam plu skribus tiun frazon.

Jakvo

FRANCA MAMUTO

En Francio, la situacio de la instruistoj rapide evoluas. La laborkondiĉoj iĝas pli kaj pli malagrablaj. La instrumetodo akre malsimplas en lando kie la sociala malegaleco grave grandiĝas. La laboristoj en tiu laborsektoro atendas multon de la ŝtataj instancoj, kaj kompense ricevas nenion.

Eĉ male, oni detruas la sistemon, tra dungado de junaj kromlaboristoj sen socialaj garantioj, tra malaperigo de diversaj instrutemoj, tra pli kaj pli granda forlasado al la lokaj instancoj. Aldone al tio la ministro publike kaj plurfoje primokis la instruistojn (pigruloj, troaj malsanforpermesoj, ktp...). Li eĉ komparis la



La mamuto estas li. En la frosto de norda poluso ni malkovris lin.

laboristaron al peza kaj prahistoria mamuto!

En februaro marto kaj aprilo, aperis nekredebla movado da protestoj ĉefe en Suda Francio. En kelkaj departamentoj oni strikis dum ok semajnoj... Oni tie baris la fervojojn, la stratojn, la aŭtoŝoseojn. Oni kidnapis la administrajn ĉefojn, ktp...

Tio apartenas al neordinara firmeco en tiu profesio, sub regado de mola sindikatismo. La periodo ŝanĝiĝis kaj ankaŭ la metodoj. Certe el tiu protestmovado, restos multaj multegaj spuroj por estontaj novaj bataloj.

Gero

* Se la kapo ne povas diri al vi por kiu voĉdoni, demandu la stomakon.

*«Saĝaj» raketoj estus utilaj, se ili trafus mensogojn.


DoMo

S.A.T.  erinaco

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

POR JUNAJ SAT-ANOJ

(En tiu ĉi spindelforma enigmo ĉiuj du sinsekvaj vortoj estas anagrame ligitaj. Temas pri neplenaj anagramoj, ĉar ĉiu nova vorto havas unu novan literon dum la aliaj literoj estas kutime alivicigitaj).



1. Konsonanto, likvido
2. Prefikso por reveno aŭ ripeto
3. Elementa peceto
4. Planedo inter Venuso kaj Marso
5. Perioda enspezo de proprietulo
6. Terspaco, grundo
7. Eniĝo profunde internen
8. Longa senpieda rampulo
9. **Internacia lingvo, oficiala lingvo de SAT**
10. Inklina al troa pensado
11. Fabela monstro, tipo de la gazetaj sensaciaĵoj.

Solvo krucvortoj de majo:

Hor. 1. Esperanto; 9. Neono; 10. Ort; 11. Iglo; 12. Trui; 13. Gap; 14. Rimed; 15. Md; 16. Komato; 17. Mitulo; 18. Busolo; 20. Venero; 21. KM; 22. Elimo; 23. Kab; 24. Laca; 25. Urno; 26. Kri; 27. Triad; 28. Atombombo.

Vert.: 1. Enigmo; 2. Segad; 3. polp; 4. Eno; 5. RO; 6. Normalo; 7. Trueto; 8. Otido; 12. Timulo; 14. Rotoro; 16. Kisema; 17. Municio; 18. Belart; 19. Amboso; 20. Velka; 21. Kanab; 23. Krim; 25. Uro; 27. Tb.



Ni ridu !

Iu sinjoro skribis al la eldonisto de grava vortaro:

- Estas vera skandalo, ke en tiel grava vortaro kiel la via oni eĉ ne trovas la vorton kiel : hortografio!